

Heinrich Heine,  
Belŝacaro

*tradukita de Richard Schulz*

Jam pasis de la nokt' duon'.  
Trankvile kuŝis Babilon'.

Nur supre en la reĝkastel'  
Fenestrojn traflagras torĉa hel'.

Reĝ' Belŝacar' de Babilon'  
Festenis en la festsalon'.

Tumultis laŭte de l' reg' sekvantar'.  
Tintigis pokalojn barbar' kun barbar'.

La reĝo aŭskultis obstine kun ĝu'  
La virojn jubili, pliiĝon de l' bru'.

Ekardas tre la reĝa vang'.  
Riskemas tre la reĝa lang'.

Kaj senpripense pekas li  
Kaj blasfemas terure, spitante al Di'.

Kaj paradas sen hont' kaj kun defi'.  
Aplaŭdas tre la koteri'.

Orgojle sonas de l' reĝ' ordon'.  
Jam hastas kaj revenas peon'.

Surkape pezas la ora vazar',  
El templo Javea la rab-akapar'.

Kaj ekprenis la reĝ' per krima man'  
La plej sanktan pokalon kun fia rikan'.

Kaj li malplenigas ĝin ĝis la fund',  
Kriaĉas el malvirta abund':

“Javeo, mi mokas pri via kron' -  
Mi estas reĝo de Babilon'!”

Apenaŭ sonis for la vort',  
La reĝon ekkaptis la tim' de l' mort'.

...

La akra ridado formortis je l' hor'.  
Silentis tuj la vira ĥor'.

Jen vidu! el la blanka mur'  
Aperis homa mankontur'.

Kaj skribis, skribis sur la mur'  
Kaj ree forigis post flamgravur'.

Jen ankaŭ for regal-plezur'.  
Rigide rigardis la reĝ' pro terur'.

La viroj sidis mutaj pro tim'.  
Horor' sentiĝis en ĉies anim'.

Eĉ magoj ne sciis laŭ rita mezur'  
Klarigi la flamskribaĵon de l' mur'.

En tiu ĉi nokt', de la servistaĉar'  
Murdata estis Belŝacar'.

*Traduko de la Germana poemo "Belsazar" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26).*

*Arg-205-409 (2013-02-26 15:10:47)*

*Tiu traduko aperis en 1984 en la n-ro 61, 1984/7 de la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiun Richard Schulz, kiu nomis sin Rikardo Ŝulco, eldonis mem. Li indikis kiel aŭtoron de la germana-lingva originalo: Henriko Hajno. Tiu estas la germana poeto Heinrich Heine. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*